579
31 JUL 1922
OF VICTORIA
3763

# La Suda Kraco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.*

**Redakcio-Administracio:**
Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

**Abono (por dek du numeroj):**
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj, aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 25. Melburno *(Melbourne)*, Australio. 10 Julio, 1922.

## INTERNATIONAL CONFERENCE CONSIDERS ESPERANTO AS PRIMARY SCHOOL SUBJECT.

A very important Conference was held in Geneva from the 18th to 20th April last, when teachers from 28 countries and official representatives from 16 Governments met at the invitation of the Institute Jean Jacques Rousseau to consider the effects that followed the teaching of Esperanto in schools. The Conference was held in the Glass Hall of the League of Nations, and was welcomed by Sir Eric Geddes, the General Secretary of the League, who said that he was glad that the League had been able to arrange that the Conference should be held in the home of the League of Nations. Another reason why the secretariat had special interest in the Conference was that the subject of the instruction of Esperanto was to be considered by the League later in the year, and officials were now busily acquiring and collating information on the subject. He was sure that the present Conference would shed valuable light on the subject, and supply the League with material that would be extremely valuable in the fulfilment of its task.

Professor Bovet, of the Institute Jean Jacques Rousseau, thanked Sir Eric Drummond, and stated the business of the Conference was to study the results that follow the teaching of Esperanto in schools, to ascertain its logical value, its moral value, and to determine the best methods of instruction.

Doctor Edmond Privat was elected President. He said that the instruction of Esperanto in schools would depend on its being shown that it would not add to an already overloaded programme. He thought that the Conference would show that Esperanto would lighten the programme.

### THE DELEGATES.

The following countries were represented by teachers: Albania, Austria, Belgium, Bulgaria, England, Scotland, Czecho Slovakia, Chile, China, Denmark, Egypt, Finland, Greece, France, Georgia, Germany, Hungary, Spain, Italy, Japan, Holland, Persia, Poland, Armenia, Russia, Sweden, Switzerland, Ukraine. There were as also in attendance official representatives of the League of Nations, International Labor

Office, International Committee of the Red Cross, League of Red Cross Societies, International Peace Society, International "Save the Children" Union, Universal Alliance of Young People's Christian Associations, International Railway Time-table Office, International Office of the New Schools, International Office for the Preservation of Aborigines, International Office for People's Rights, International Bahaista Movement, International Roman Catholic Young People, International League of Women for Peace and Liberty, Worlds Union of Women, League of Hebrew Women, World Zionist Movement, League for Ethical Education, Social School for Women, French Chamber of Commerce in Geneva, Italian Chamber of Commerce in Geneva, Spanish Chamber of Commerce in Geneva, Ukraine-Swiss Chamber of Commerce.

### STATISTICS SUBMITTED.

Bulgaria: Esperanto taught in 25 schools—784 pupils.

Czecho Slovakia: Esperanto taught in 19 schools—815 pupils.

France: Esperanto taught in 1 school—50 pupils.

(Although Esperanto is not officially taught by the State, many hundreds of children have been instructed in Lille and St. Omer. The Chamber of Commerce teaches it in educational institutions under its control).

England: Esperanto taught in 18 schools.

Holland: Esperanto taught in 36 schools—1500 pupils.

Hungary: Esperanto taught in 13 schools.

Austria: Esperanto taught in 30 classes in Vienna.

Switzerland: Esperanto compulsorily taught in schools of Geneva Canton—13 schools—400 pupils.

Germany: Esperanto taught in 123 schools—4000 pupils (300 groups in 200 towns; half a million Esperanto textbooks sold; 600 competent teachers).

Italy: No figures are available regarding teaching in schools. Milan has 34 classes—1200 pupils; Cremona has 225 pupils; Bologna has 200 pupils. There are 40 other groups consisting of 1300 members. Three hundred persons capable of teaching.

Teaching is retarded by lack of qualified teachers in Bulgaria, Czecho Slovakia, Britain, Germany, Ita and, in greater or lesser degree, other countries.

### WHAT THE TEACHERS TESTIFIED.

No less than 30 teachers spok regarding the pedagogic aspect of the effects of Esperanto teaching. They declared that Esperanto did not any way impair the use of the mother tongue, that it is a help in the study of foreign and the classical languages, and that the study of Esperanto assists the comprehension of grammar of foreign languages. The conclusions arrived at by the various delegates were that Esperanto was generally helpful, added to the reasoning power, improved the pronunciation of the mother tongue, is specially helpful to those studying French, German and Latin, assists grammatical analysis, defines ambiguous national phrases, conduces to correct spelling in the mother tongue gives precision to meaning of prepositions, shows the true meaning of affixes and suffixes and stimulates interest in foreign languages. The Chinese delegate said "In China one learns English during at least six years, French seven, German eight Russian ten, but Esperanto needs only two years."

### THE MORAL VALUE.

Children have remarked on the value of Esperanto. In England they had remarked to their teacher "that it would help the peace of the world." "by Esperanto we have brothers and sisters in every country." Czecho Slovakian children said "the frontiers between the nations disappear as well as racial hatred."

Esperanto is making the small nations known throughout the whole world. The delegate from the Netherlands said "the children in one town guided foreign Esperantists through the town and learned to love and understand the foreigners. Esperanto fosters a community of sentiment." Other delegates testified that parents often wrote appreciatively of the benefits the children had received and averred that Esperanto stimulated interest in literature and geography. Teachers also benefited by it. The Scottish delegate said that Esperanto was the best means of

arousing interest in the study of geography.

HOW AND WHEN ESPERANTO SHOULD BE TAUGHT.

The questions before the fourth sitting of the Conference were,—Are there any school children totally unable to learn Esperanto? In what proportion? Is that cause one of memory or of lack of logical capacity? Does the normal course of instruction vary according to age of pupils? Have you any interesting experiences to relate concerning any particular method of instruction? How, how much and from what stage of proficiency do you use the speaking method and the translation? Have you remarked errors in method of instruction that should be avoided? Would you recommend the instruction of Esperanto before other languages? Would you recommend the continuance of instruction of Esperanto for more than one year, or simply the instruction of another branch of learning by means of Esperanto, to retain facility in the language? This sitting was more or less technical. The conclusions arrived at were that all normal children are capable of learning Esperanto. That the same methods of teaching should be followed as in other languages. That the time necessary to learn varies according to the age of the child. A two year course is recommended for children, the most suitable age is 12-13. The chief errors are in pronunciation. Esperanto should be taught before foreign languages.

SHOULD INSTRUCTION BE OPTIONAL OF COMPULSORY.

The consensus of opinion was that instruction should be compulsory, but for the present, owing to the lack of teachers, it should be optional for children or their parents whether they took up the study or not, but once it was decided to enter on the prescribed course it should be compulsory for the child to work through the lessons as in any other school subject. A "Manifesto to Teachers throughout the World" was issued. This Manifesto is issued as a supplement to the "Suda Kruco," and every reader is urged to see that his or her copy finds its way to the head teacher of the local school.

DO PARLIAMENTS APPROVE?

The fifth sitting was devoted to receiving replies to the following queries: Is Esperanto taught in your schools as an experiment or in pursuance of a decision to permanently include it in the curriculum? Who decided upon it? Who proposed it? Who supported it? What is the attitude of the national parliament or other body controlling education? Has the authority concerned attempted to induce other countries to teach Esperanto? The replies showed that the circumstances were different in the various countries. The Conference decided that the Commission appointed by the Prague Congress to collect proofs in order to convince parliaments that the request to allow Esperanto to be taught in the schools came from all countries, and to help parliaments in the matter if called upon, should be made a permanent body. The Conference resolved to urge all national Esperanto societies to approach their parliaments with the proposal that Esperanto be taught in the primary schools on the condition that it is taught in the schools of other countries.

REQUEST TO LEAGUE OF NATIONS.

The following Memorial was drawn up for presentation to the League of Nations:

"The International Conference regarding the instruction of Esperanto in Schools,

Having examined the experiences and results attained, submits to the favorable consideration of the League of Nations the following recommendation which expresses the desire of the educational authorities officially represented at the Conference, and

Having ascertained the language difficulties which hinder direct relations between the peoples and

Having ascertained the urgent necessity of finding a means to facilitate a good understanding between the nations—

Having ascertained the already considerable spread and growth of Esperanto and the remarkable results attained by instruction in this auxiliary language in the public schools of many countries where its educational value is attested—

The League of Nations is asked to recommend that this instruction be made general in the public schools of all countries as a practical and popular means of international communication without in any way aiming to injure the ancient prestige of the national languages.

The League of Nations is asked to invite its members to make known to it the steps that they will take in the matter, whether by enactment or by administrative decree, so that the General Secretary may be able to inform the League of the stage of reciprocity and universality of such steps."

### POLICE THANKED.

Among the resolutions passed was the following: "This Conference of Teachers, knowing the great practical value of Esperanto, is in sympathy with the present study of Esperanto by police officials with the object of helping foreign visitors and recommends the chiefs of police in all countries to support its instruction."

### THE CLOSING OF THE CONFERENCE.

The Conference recorded its thanks to the League of Nations. It was only by the hospitality and help of the League that the Conference was able to be so methodically conducted.

Dr. E. Privat in closing the Conference placed on record the thanks of the delegates to the Institute J. J. Rousseau and to its eminent director, Professor Bovet, and to the tireless helpers of the local organising committee who so unselfishly worked out every detail. The introduction of Esperanto into the school programme now had strong documentary support. The experiments already made showed that parliaments would risk nothing in introducing the language, for instead of overburdening the programme it would, on the contrary, facilitate the other studies and save valuable time. This is the important new fact proved by the present Conference. The publication of the irrefutable facts recorded by the Conference would undoubtedly have satisfactory results. The world is tired of mere words. It wants facts. The Conference had supplied them. Dr. Privat concluded by saying: We are not striving for material interests but for the highest human ideal. While thinking of the children of the world, of the boys and girls in the West and the East, gladly hurrying to school with their copy book under their arm, we wish to devote our lives so that they will never be called upon to fight one against another in a world war and destroy each others' homes and countries. By our modest but firm part in the reconstruction of the new world we desire to assure to these little ones of the coming generation a bright springtime and peaceful gathering of the happy flowers on the green field of peaceful concord.

### HOW THE CONFERENCE WORKED.

The language of the Conference, of course, was Esperanto. During the sittings members of the League of Nations, staffs of the various consulates and others who heard the debates expressed their surprise that the delegates spoke Esperanto so easily and fluently. They were also struck with the remarkable number of speakers—every delegate spoke more than once. The Conference was helped by the Esperanto members of the League of Nations Secretarial staff. The agenda papers, reports, propositions and resolutions for discussion or acceptance were translated with marvellous rapidity from Esperanto into English and French and vice versa, carefully printed by cyclostyle and distributed among the delegates with a celerity that was truly amazing. These officers assert that they never took part in any congress which did so much work in so little time. The proceedings being in one


**HAROLDO PUDNEY**

**Kuracisto de Fonto-Plumoj**

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

language enabled three times as much work to be done in the time as compared with other conferences where the speeches had to be translated two or three times.

(The foregoing is summarised from the reports published by "Esperanto," the journal of the Universal Esperanto Association, Geneva, and by "The British Esperantist," London. To both these journals we express our acknowledgment with hearty thanks.—Red.).

---

## Nia Tria Jaro.

Ĉi tiu numero kondukas nian jurnalon en la trian jaron de ĝia ekzistado. Ĉu ĝi travivos ĝin? Vi, karaj legantoj kaj subtenantoj devas respondi.

Trarigardante la malnovajn numerojn ni vidas, ke ni faris iujn negravajn erarojn, sed ne tiom ke ili fariĝis videbla makulo. Samtempe ni konstatas ke la Suda Kruco ludas seriozan rolon, prezentante al la aŭstralazia samideanaro fidelan bildon de la faradoj de nia movado ĉi tie kaj eksterlande, kaj kronikon de ĝiaj progresoj. Sen egoismo, ni kredas ke la ĵurnalo estas utila ligilo inter la grupoj en la diversaj ŝtatoj.

Ni presigis originalajn historietojn, artikolojn kaj poemojn, kiuj montris ke talento por verkado ne malestas sub la signo de la Suda Kruco. La artikoloj kaj poemoj, kiujn ni elĉerpis el alilandaj ĵurnaloj sendube helpis eduki la legantaron en tiu internacieco de sento, kiu estas la ĉefa celo de nia lingvo.

Ĉar la presisto ne scias nian lingvon, li ofte faris eraron penante korekti alian. Pro deziro al akurateco, aŭ penso pri kosto, ni, preskaŭ malesperante, devis lasi presiĝi la malkorektaĵon, foje post tria lego de la presprovaĵoj. Krom la presado la tutan laboron faris areto de sindonaj samideanoj, kiuj dediĉas multon el sia libera tempo al la necesa laboro pretigi kaj poste dissendi la ĵurnalon. Al ĉi tiuj ardaj laborantoj ni donas niajn sincerajn dankojn kaj esperas ke la daŭra subteno de la aŭstralaziaj esperantistoj montros ke ili plene taksas la kvanton kaj la valoron de la laboro, kiun oni devas fari por aperigi eĉ tian malgrandan ĵurnalon, kia estas la Suda Kruco.

## La Hejmo.

Povas esti, ke ĝi estas hipotekita al malriĉegeco; eble la pordo ne estas riglita kontraŭ korpremo, malsato kaj doloro; eble ĉiama funebro sidas ĉe la kameno — tamen la hejmo estas la hejmo!

Meze de Atlantiko ĉirkaŭ duondistance, laŭ rekta linio, inter Capetown kaj Montevideo vulkana energio en praepoko ĝis super la maro ŝovis grandegan rokon — la malgrandan insulon Tristan da Cunha, senŝirman, senfruktan, la vorticejon, de sovaĝaj ventegoj, la centron de regiono de preskaŭ senĉesaj pluvoj, ĉiam envolvita de nuboj, evitatan de ŝipoj. Tamen de antaŭ jarcento logas en tiu insulo stranga komunumo de homoj, devenintaj de Anglujo, Holando, Irlando, Italujo kaj Ameriko, — homoj, kiuj de tempo al tempo pro ŝippereoj estis ĵetitaj de la oceano sur la marbordon aŭ venintaj tien pro tedo pri la multafera mondo, kaj vivas per fiŝaĵo kaj surbordaj trovitaĵoj el pereintaj ŝipoj.

Tiuj homoj, nun en la nombro de ĉirkaŭ okdek — viroj, virinoj kaj infanoj — suferas mizeron kaj senhavecon, kiujn preskaŭ ne povas prezenti al si loĝantoj en pli favorataj landoj.

Ĉar la insulo ne havas taŭgan lignon, la kabanoj de la insulanoj estas konstruitaj al nemorteritaj masoj de krudaj ŝtonoj kun tegmentoj el herbo.

Pro tio, ke la svarmoj da ratoj devenintaj de pereintaj ŝipoj manĝas ĉiun semitan grenon, faruno estas havebla sole el preterpasantaj ŝipoj, kaj por viziti ilin la insulanoj devas remi multe da mejloj.

Troviĝas tie nenia registaro, neniu lernejo, neniu preĝejo. La stato de la insulo ne povas pliboniĝi, la sola perspektivo de la tieuloj estas tiea entombigo.

Estas dirite ke tiuj mizeruloj estas inteligentaj, laboremaj, ŝparemaj, sobraj, tial oni supozus, ke ili volus ĝoje forlasi siajn krudajn kabanojn, kompatindajn malriĉegecon kaj senesperecon por reiri la komfortan mondon.

Sed ne! La Brita registaro ree kaj ree proponis formovi ilin, kune kun ilia malmulta havaĵo, for de la

senŝirma insulo en kiun ajn de ili elektotan landon de la Brita imperio, kaj doni al ili rimedojn por fari novan ekiron en la vivo. Neniu volas forlasi la insulon. Sur ĝi estas ilia hejmo kaj tie ili volas resti.

Eble, unu loto en la vivo ne estas multe pli bona aŭ malbona ol alia, de la vidpunkto de efektiva feliĉeco; sed iaj aĵoj ŝajnas tre necesaj por homoj, kaj unu tia aĵo en la kreaĵo de Dio estas la loketo nomata la hejmo.

La hejmo, kian ajn mizeron ĝi enhavas, estas la plej bona loko sub Ĉielo. Bona havaĵo estas abundo, komforto, luksaĵoj, kulturo. Sed de tio ne estas sufiĉo en la tuta mondo por kompensi la perdon de la plej simplaj ĝojoj de la plej malriĉa hejmo lumata kaj varmigata de amo. Prospero estas altvalora beno al tiu, kiu ĝin meritas kaj povas elporti. Sed la tuta riĉo de minejoj, bienoj, fabrikejoj ne povas doni tian veran ĉiamdaŭran kontenton, kian donas la riĉo el amo kaj fido kaj sinoferado, ĉar tio faras la hejmon la bazangula Ŝtono de civilizacio.

Majesta domego kun siaj riĉaj tapiŝoj, altvaloraj pentraĵoj kaj ĉia luksaĵo aĉetebla per mono ne povas esti vera hejmo escepte se amo estas ĝia kamenbrilo, fideleco la fortika pordo fortenanta la malvarmecon kaj maljustaĵojn de la mondo, kaj fido la bona tegmento spitanta ties malserenon.

Amo, fideleco, fido estas la solaj trezoroj nepre necesaj por la vera hejmo de kiu ajn koro. Tio en la plej malriĉa dometo; tio sendoma sub nigra ĉielo; tio senŝirma, malsata, nuda faras feliĉa la hejmon, kie ajn ĝi sidas.

La vera vivo ne estas ekster sed en la homo. La veraj posedaĵoj ne estas tio prenebla de la manoj, sed tio, kion povas teni la koro.

(El "The American" tradukis "Gego").

(Noto: Ni ĵus legis kablan depeŝon en tagĵurnalo, kiu sciigas, ke post misia laboro aliloke, angla pastro kaj lia edzino elŝipiĝis el brita militŝipo kaj restos sur Tristan da Cunha dum unu jaro, por starigi preĝejon kaj lernejon kaj tiel metu la loĝantojn en harmonion kun la religia kaj kultura vivo de pli favorataj landoj.—Red.).

## Neniam La Amo Perdig'as.

Ĉe sia fenestro la koketulino
Tralegis leteron de amo sincera;
"Alia," ŝi ridis; "ha! ha! belulino
Ja regas la virojn kun ĉio cetera.

"Nu, ĉu mi elektos ĉi tiun ameman?
Ne, ne," ŝi ridetis, "ankoraŭ mi ludos;
Trapiki mi volas la koron cedeman,
Kaj kiel la sango elfluos mi studos."

" 'Ho, mia plej kara," ŝi legis,
" 'memoru,
Por ĉiam la vortojn de amo mi
diras' "—
"Jes, ja," ŝi mokridis, "mi ilin adoru
Tiele, kaj ĉiun en pecojn mi ŝiras."

Malfermis fenestron la manoj beletaj,
Al vento sovaĝa la pecojn ŝi ĵetis:
"Ĝis lacaj, do!" diris la lipoj ridetaj,
Kaj moke la manon sur koron ŝi
metis.

La vento disigis la pecojn kaj pelis
En cent da direktoj la blankan
paperon,
Sed tiam Anĝelo de Amo ĝin celis,
Samtempe bridante la ventan koleron.

Subite ekblovis dolĉega venteto,
Kaj jen papilioj belegaj kaj blankaj
Aperis por ĉiu papera peceto,
Farita de manoj kruelaj, sendankaj.

En cent da direktoj la aro ekiris;
La aron de ampapilioj faritaj
El ama letero l' anĝelo amtiris
Al homoj sur vojoj malĝoje baritaj.

La ampapilioj la barojn transflugis,
Ŝarĝitaj de pensoj de ama sincero,
Kaj, kie la korojn malĝojo jam plugis,
Disŝutis la semojn de ĝoj' kaj espero.

Neniam la amo perdiĝas, sed ĉiam
Ĉirkaŭe la suno de ĝia potenco.
La bonon eternan radias eĉ kiam
Elpuŝas ĝin moke la malbonintenco.

Originale verkis, Matildo Direktilo.

---

## Recenzo.

**Perloj el la Oriento:** Tradukoj el Japanaj kaj ĥinaj klasikaj verkoj de K. Ossaka. Eldono de Nippon Esperanto-Sya, Tokyo, (Japanujo). 38 paĝoj. Prezo: Y. 0, 50, afrankite.

La orientaj lingvoj ne okupas grandan lokon en nia Esperanta literaturo, kaj ĉiu aldono al la

kolekto de aziaj tradukoj estas havinda. Des pli havinda, kiam la tradukaro estas tiel bone elektita kaj bonstile farita, kiel ĉi tiu. La tradukinto, sinjoro K. Ossaka, klarigas, ke "pro fundamenta lingva diferenco orientaj literaturaĵoj certe ne estas tradukeblaj en Eŭropajn lingvojn, oni ofte predikas. Sed alia afero tamen kun la lingvo internacia. Dank' al ĝia libera strukturo mi mem trovis mirindan facilecon en la tradukado," kaj tiun facilecon pruvas la flua kaj klara lingvaĵo de la tradukoj, kvazaŭ de originalaj verkoj.

La antikva, la mezepoka, —la moderna. . . ĉiu havas sian lokon en ĉi tiu malgranda sed alloga kolekto. La trideksilabaj odoj el la "Mannjoŝu," poemaro verkita inter la tria kaj la oka jarcentoj, montras la simplan, koncizan stilon de la orienta vortpentrado. Jen unu odo de Kakinom-oto-no-Hitomaru; multo en malmulta spaco:

> Super la kamp' orienta
> jam moviĝas matenlum',
> ĉe l' horizont' okcidenta
> pala jam la malnovlun'.

En la pecoj el la verkoj de K' ung-Tzu (Konfucio) kaj Meng-Cu (Mencio) ni trovas tre malnovajn ideojn, kiujn oni de tempo al tempo kredas tre novaj. Eble niaj modernaj sociaj reformistoj povus iom lerni de ili.

Interesa estas la artikolo pri la "Omoro-Soŭŝi," poemaro farita inter la dek-dua kaj dek-sepa jarcentoj en la antikva Luĉa lingvo, al kiu oni sukcesis nur en nia tempo trovi la ŝlosilon. Noto informas nin, ke la aŭtoro, sinjoro F. Ifa, Luĉano, kiu la unua post longa, pena laborado ĵetis lumon sur ĉi tiun mirindan verkon, estas samideano, membro de la Luĉa Esperanta Grupo. La sekvanta specimeno estas tipa:

> He, la novlun' sur ĉielo?
> Ho, la pafarko de l' dio!
> He, la venus, sur ĉielo?
> Ho, la sagpinto de l' dio!
> He, la stelar' sur ĉielo?
> Ho, harornamo de l' dio!
> He, la trennub' sur ĉielo?
> Ho, la orzono de l' dio!

Kaj sinjoro Ifa aldonas:

"Simpla! kaj oni sentas, kvazaŭ li legas el Hebrea poezio, ĉu ne? Tiun ĉi pecon de poezio, verŝajne, versis nia prapatro dum sia marveturo en la somera nokto, rigardante supren sur la tropikan firmamenton surŝprucitan per astroj. Tio ja devas esti la pretervole ellasita krio de admiro al la belo de la naturo kaj al Dio, fonto de l' belo de la naturo. Ĉu ne vera muziko mistera?"

Perloj el la Oriento donas modestan sed valoran videton de la azia literaturo. Ni esperu havi en la estonteco ankoraŭ multajn similajn enrigardojn en tiun vastan trezorejon. —A.D.

## Kroniko.

**Hobarto,** Tas.—Lastatempe s-ro K. S. Simmons gajnis la diplomon de la British Esperanto Association. Li estas la dua membro de ĉi tiu tre malgranda grupo gajni la diplomon. Gratulojn!

**Sidnejo,** N.S-K.—La grupo nun kunvenadas ĉiun jaŭdon en la Workers' Educational Association Club Room. S-ro L. E. Thomson, tre agema Esperantisto ĝis nun loĝanta en Melburno transloĝiĝis en Sidnejo'n. Ni esperas ke lia entuziasmo pliviglígos nian movadon en la "Havena Urbego."

**Melburno,** V.—La koncerto en Melburno, la unuan de julio, por helpi la financojn de la Universala Esperanto Asocio, estis grandega sukceso, kaj de muzika flanko, kaj de financa vidpunkto. Oni povos sendi pli ol dek funtojn al la U.E.A. La komitato kiu ĝin aranĝis kore dankas ĉiun, kiu helpis, ĉu en vendado de biletoj, ĉu en aliaj manieroj.

**Williamstown,** V.—Grupo el instruistoj kaj antaŭaj lernintoj nun kunvenas ĉiun mardon vespere ĉe la Williamstown Altlernejo. Ni ŝuldas dankojn al la Ĉefinstruisto, kiu estas tre favora al la instruado de Esperanto en lernejoj.

## Nia Propagandisto en Europo.

Further interesting letters have been received from s-ro Hudson. He found that Esperanto is making great progress in Bulgaria. The Sofia groups number 500 members. Esperanto is an optional subject in 25 schools, the government paying the teachers. During his stay in Sofia he visited four group meetings and participated in a Sunday excursion. On market days numbers of villagers visit the capital. S-ro Hudson writes: "The village women have

their hair in plaits hanging down their back. The dress is short and much decorated with gold and bright coloured braids. A white under-skirt is worn, at the bottom of which is a round of hand-made lace about six inches deep which descends below the dress. Woollen stockings of the brightest colours obtainable complete a very picturesque costume." The Esperantists were very very helpful during his ten days stay in Sofia. S-ro Hudson was never left alone, and was treated quite as an eminent visitor.

On 28th March S-ro Hudson started for Belgrade, the capital of Jugoslavia. Two hours train journey took him to the frontier, where he had to buy another ticket and comply with customs formalities. Belgrade was reached the following morning at six o'clock. The letter relates: "Here my troubles began. My passport was taken from me, and I could not get it back. I was told that the visa that I got in Constantinople only gave permission to go through the country, but not to stay in it, and that I must go on by the next train. This I could not do as I had no visa for any other place, so I could not stay and I could not go on! I went to the British Consul, and he telephoned to about a dozen places. They refused to give the passport to him, and finally he gave me a letter to the chief of the police in Belgrade. No one there could speak English, and I didn't know what I had to do, so I hunted up the Esperantists, one of whom came with me and explained affairs, and finally I got permission to stay seven days in Belgrade, which gives me a chance to get visas. But for the Esperantists I might have had a bad time." Esperanto activity is not very marked in Belgrade, chiefly through lack of organisation. One cheering feature is the fact that s-ro Klojic is teaching a class of 60 children. The fortress and parts of the city are in ruins as a result of Austrian fire early in the war from the other side of the Danube. On 1st April there was an earth tremor. No damage was done, but the residents were more or less scared. Esperanto help was forthcoming to secure a visa for Roumania. To leave Jugoslavia is nearly as difficult as to get permission to stay for a few days. Jugoslavia is about five times bigger than Servia was before the war, and is now quite an important country. At the time of s-ro Hudson's visit preparations were in progress for the wedding of the King, which has since taken place. At five in the morning of 2nd April s-ro Hudson left Belgrade by paddle steamer, and journeyed 200 miles down the Danube, on the way passing through the celebrated "Iron Gates." These are perpendicular stone cliffs 2000 feet high, and extending on both banks of the river for many miles.

## Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—E. Ely, 4/6; L. C. Raymond, 10/-; H. M. Lanyon, £1; L. O'Connor, 4/6; W. E. Hill, 4/6; H. C. Bradshaw, 5/-; — Wilson, 4/6; H. Conwell, 4/6; B.E.A. Exam. Committee (F-ino Helm, s-ino Bigelow, s-ro A. R. Cohen), £1/8/6; C. C. Dornbusch, 4/6; H. Hansen, 5/-; N. Gaye, 5/-; — Frewer, 5/-; — Taylor, 5/-; A. Hughes, 5/-; E. Lee, 5/-; M. Purnell, 4/6; — Saw, 4/6; R. Bigelow, 4/6.

S-ro Gani Ganĉev Bul. Ferdinand 39, B./1, Sofia, Bulgaria, volas korespondi.

Cole's Book Arcade, Melbourne.
Two Million Books and Pieces of Music.
Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.
Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.